

KOMITATAJ FORUMOJ — Torino 2023 — Raporto pri rezultoj kun rekomendoj

Unua forumo: Rilatoj kun la ekstera mondo — dimanĉon, la 30-an de julio

- Ni ne enfermiĝu kaj parolu nur al ni mem se kresku la uzado de la lingvo.
- Zamenhof: ni direktu nin eksteren kaj parolu al kleruloj kaj la ĝenerala publiko.
- Utilo de forumoj (CED, ESF, UEA@UN) por konfirmi respekton por Esperanto.
- **Necesas identigi kion esperantistoj povas fari tiucele individue kaj grupe.**
- Se ni helpas al aliaj pri iliaj idealoj kaj interesoj, ili pli emos helpi al ni.
- Ekzemploj: Bona Espero (orfoj); helpo al rifuĝintoj; tujtradukado de deklaroj.
- Komprenu kiom gravas lingvaj rajtoj kaj helpi al aliaj informiĝi pri ilia graveco.
- Alianciĝo kun minoritatoj ege valoras: 94% de la mondo estas "minoritataj".
- Konsciu la efikon de la angla lingvo pro ĝia disvastiĝo kiel monda dua lingvo.
- **Ni bezonas gvidlibreton (ankaŭ ĝisdatigatan retejon) por rebati argumentojn.**
- Ne nur respondi al argumentoj sed aktive helpi al grupoj kiuj bezonas helpon.
- Nia lingvopolitika poziciaro pri lingva diskriminacio devus esti pli ampleksa. .
- **Necesas pliampleksigi niajn sciojn kaj ricevi trejnadon por pli efike labori.**
- **TEJO estas bona ekzemplo pri lingvopolitiko kaj trejnado, do ni lernu de ili.**
- Gravas montri jamajn sukcesojn kiam ni helpis al aliaj (rifuĝintoj, daŭripovo).
- Kiel celo, ni montru ke esperantistoj estas fakuloj pri internaciaj rilatoj.
- Faciligi al internaciaj organizaĵoj nian sperton, retojn en tutmonda komunikado.
- Se ni scias rilati kun internaciaj organizaĵoj, tiuj povas subteni nin ankaŭ finance.
- Krei pli da universitataj forumoj pri Esperanto por kuraĝigi pli vastajn esplorojn.
- Ni subtenu la laboron de UN-grupoj en Nov-Jorko, Ĝenevo, Bruselo, Vieno.
- Gravas uzi la QUORA-apon por respondi al konversacioj pri lingvoj.
- Ni profitu el la fakto ke en diversaj retejoj oni povas sendi demandojn, reagojn.
- Multaj personoj efektive interesiĝas pri lingvoj, do ni ekspluatu tiun intereson.
- Povas esti ke ni ne trovas akceptemon de artikolo, sed ni petu helpon de aliaj.
- Valoras la tempon disvastigi scion pri nia lingvo ĉar tio favorigas la publikon.
- Oni kunlaboru en enketoj pri lingvoj, ĉar ofte respondantoj favoras Esperanton.
- Ni kunlaboris en la enketo pri la estonteco de Eŭropo, ne sukcese sed kun efiko.
- Ni povas servi per multlingvigo de niaj eventoj por montri nin konsciaj pri tio.
- Ni daŭrigu niajn kontaktojn kun UN, Unesko, NRO-j, ĉar tra la jaroj tiuj tre efikis.
- Ni aparte serĉu parencajn organizaĵojn, NRO-jn, kiuj sekvas niajn idealojn.

KOMITATAJ FORUMOJ — Torino 2023 — Raporto pri rezultoj kun rekomendoj

Dua forumo: Instruado Mardon, la 1-an de aŭgusto

1. Aurora Bute prezentas la kuntekston de E-instruado en Europo, Azio kaj Afriko, kaj konkretajn iniciatojn/agadojn/projektojn/forumojn. UEA kaj ILEI provizas kvalitajn kaj altnivelajn rimedojn por diverskampa kapabligo:

Nova nivelo KER-C2 en la ekzamensistemo de UEA

– partnereco inter UEA kaj AdE por agnosko de la KER-ekzamensistemo. Jam estas konfirmata la tria mandato de la katedro pri Interlingvistiko kaj Esperanto en la Universitato de Amsterdamo en Hago por la daŭra laboro de Federico Gobbo.

2. Duncan Charters parolis pri la graveco trovi preparitajn instruistojn se lerneja sistemo interesiĝas pri la instruado de Esperanto. Ni ekzameni niajn rimedojn, aparte edukado.net, kun pli, kaj krome havu konsult-servon por novaj instruistoj.

3. La NASK-kursaro multe plibonigis la lingvonivelon de usonanoj. Instruado do povas inkluzivi novajn lernantojn sed ankaŭ aliajn nivelojn. Ĉi-jare venis 60 kursanoj kaj ili dividiĝis precize en tri grupoj, post-baza, meza kaj supera. En nia instruado ni devas provizi rimedojn por progresigi lernadon je ĉiuj niveloj.

4. Gong Xiaofeng (Arko) prezentis la nunan situacion de E-kursoj en Ĉinio, iom pesimisma, pro emeritiĝo de pluraj instruistoj en kernaj universitataj postenoj. Alessandra Madella prezentis la projektojn de ILEI, kiuj sukcese okazas, iuj kun stipendioj de Eŭropo: Esperanto-kursaro *Tibor Sekelj (EToSo)*, *30 Oraj Horoj*.

5. Ni devas trejni kaj la lernantojn kaj la instruistojn, do ni planu kiel fari kaj preparu gvidilojn. Preferindas la retaj kursoj KUN instruistoj, por allogi la kursanojn al la agado: la sukceso de la Kolombia kurso dependis de tio kaj efika varbado de novaj esperantistoj. Necesas trejnado por profesiigi la instruistojn.

6. Por la estonteco, ni starigu kun ILEI komisionojn kies tasko estas prepari la vojon paŝon-post-paŝo al pli vasta akcepto de Esperanto en la lernejoj. Tio estus ne nur por povi pli facile lerni la lingvon. Hodiaŭ kulturaj interŝanĝoj estas vaste dezirataj, sed ofte ne sukcesas. Ni maturigu la grundon, ĉar nur Esperanto kapablas provizi egalecan sperton kun tutmonda interkultura riĉiĝo post relative mallonga tempo en la lernado. Ni atentu por instruistoj bonan prepariĝon por gvidi interkulturajn lingvoklasojn. Lernantoj bone lernu, ĉu kun instruisto aŭ ne.

KOMITATAJ FORUMOJ — Torino 2023 — Raporto pri rezultoj kun rekomendoj

Tria forumo: Informado Ĵaŭdon, la 3-an de aŭgusto

Duncan Charters enkondukis la sesion per reliefigo de kelkaj sukcesoj en informado aŭ komunikado: la UK en Torino (gazetar-konferenco, pluraj artikoloj, radio/televideo), transdono de BHH al la Nacia Biblioteko de Pollando (pluraj televidaj intervjuoj), usona programo en la Nacia Publika Radio vaste aŭskultita.

Post listigo de mankoj en nia informagado, li prezentis Lu Wunsch-Rolshoven, nova part-tempa dungito de UEA por tiu kampo, kiu prezentis sian sperton en la informado kaj reagis, kungvidante viglan diskuton pri kiel atingi multe pli ol UEA faris antaŭe. Jen kelkaj el la ĝisnunaj mankoj en la informado:

- Mankas konstanta inform-politiko
- Mankas respondeculo/komisionoj pri kunordigado
- Mankas regula informado al la amasmedioj
- Mankas strukturo por daŭra monda informado
- Mankas abonservo pri mencioj de Esperanto
- Mankas reag-teamoj por difinitaj medioj en la amaskomunikiloj
- Mankas utiligo de jam haveblaj komunikiloj
- Mankas trejnado: kiel rilati al amaskomunikiloj?

Se nur 1-2% de la publiko scias pri Esperanto, kiel ni tion altigu plej efike?

La diskuto tuŝis la sekvajn temojn kaj demandojn:

- Ĉiu devas kontakti amikojn, junulojn por ke kresku la nombro de esperantistoj.
- "Ĉu vi parolas la francan?" Oportune paroli pri Esperanto post la respondo.
- Unue fari esperantistojn per amikeco. Multnombraj, oni invitas la urbestron!
- Ni serĉu ĵurnalistojn kiuj publikigis ion pri Esperanto, kiuj estas pli amikemaj.
- Informado al eŭropaj esperantistoj por fari afiŝojn. Entuziasmo ne granda.
- Denaskaj parolantoj de la angla malaltiĝis al duono (4-5% nun, ne plu 10%).
- Ĉu ni pliobligas la elcenton kiu parolas Esperanton?
- La ideo ke la angla jam venkis kaj solvas ĉiujn komunikajn problemojn.
- Italujo: pli ol 2/3 tute ne bone kapablas paroli la anglan (multaj diras malpli).
- La batalo neniel estas perdita inter Esperanto kaj la angla.
- Literaturo havas bonan efikon se gravaj verkistoj estas honorataj publike.
- Afiŝu en propra retejo se vi havas, kie homoj respektas vin.
- Restu malkontentaj sed ne estu pesimismaj.

- Kiel verki artikolon por ĵurnalo fake, profesie, kaj kiel interrilati kun ĵurnalistoj.
- Kiel eniri al Vikipedio. Ne ĉiuj niaj informoj estas akceptataj de redaktoroj.
- Sociaj retoj gravegas por la informlaboro hodiŝu.
- Ni notu niajn sukcesojn 400+ membroj de TEJO kaj UEA el Kolombio+.
- Kunlabori kun esplorgupoj gravas. • Komuna laboro de ni ĉiuj.
- UEA nun havas rimedojn., do povas dediĉi kelkajn al efika informado.
- Do Lu Wunsch-Rolshoven okupiĝos profesie, salajrate por antaŭenigi la agadon.
- Necesas fari seminariojn, trovi volontulojn, multaj temoj kiujn li kunordigos.
- En sociaj retoj ni ricevos Google-subtenon por anoncoj.
- Necesas solvi la problemojn antaŭ ol lanĉi novan sistemon.
- Aŭtomataj pagoj por remembriĝo venos kun nova sistemo.
- Ateleroj dum UK kaj aliloke. Homoj poste okupiĝu pri la rilatoj.
- Baza sinteno pri volontula laboro – kiel ŝanĝi la malemon kiun ni spertas?
- Oni ne tro atentu de UEA. UEA povas doni ideojn, havi platformon por interŝanĝi ideojn kaj spertojn. Pensu tutmonde, sed agu surloke.
- Senpagaj ĵurnaloj devas ricevi informojn de lokano.
- Ekzistas niaj respektivaj publikoj: "publiko" povas esti tre diversa..
- Senpagaj ĵurnaloj devas ricevi informojn de lokano.
- Ekzistas niaj respektivaj publikoj: Homoj kiuj jam scias ion pri E^o, homoj kiuj ne.
- Ni povos havi grandan venketon pro tiu nova iniciato.
- Ni devas korekti la opiniojn de lingvistoj pri E^o, sukceso en Irano.
- Ili povas konvinkiĝi post informado.
- Ni iru en klasojn en lernejoj por informado, "unu leciono por ĉiuj", kaj aliaj.
- Aliaj specoj de eksperimentaj programoj gravos en la estonteco.
- Nun lingvistoj kiel Roberto Garvía, *Esperanto and its rivals*, sciigis al ni ke ili ne plu hontas esplori pri Esperanto-rilataj temoj, ĉar sufiĉe da seriozaj lingvistoj, sociologoj, historiistoj, eĉ mondfamaj, okupiĝis serioze pri Esperanto. Tio estas granda progreso, ĉar antaŭe konataj universitatoj kaŝis sian esperantistecon publike. Interesa kazo de tio estas H. Lionel Elvin, konvinkita esperantisto kaj kontribuanto al la movado, Direktoro de la Fakultato de Edukado en la Universitato de Londono, kies sekretario (mia onklino) tute ne sciis ke li havas intereson pri Esperanto (ŝi laboris por li eble du jardekojn). Prof. D-ro Ivo Lapenna iam diris al la junaj universitatoj de Cambridge, Oxford kaj London ke lia ĉefa celo por Esperanto estis seriozigi la mondon de universitatoj kaj esploristoj pri Esperanto. Kvankam certe ne universale atingita, ni faris bonegan progreson tiurilate, do en nia informado ni daŭre atentu tiun mondon de la "kleruloj" same kiel la ĝenerala publiko, la du celgrupoj de D-ro Zamenhof.